INFORMA BULTENO

BOLLETTINO D'INFORMAZIONE

1912

Bolonja Esperanto Grupo
Gruppo Esperantista Bolognese
"Achille Tellini 1912"

Via Avesella 16 - 40121 Bologna
tel-fax: 051-6446675
gesperbo@ iperbole.bologna.it
www.comune.bologna.it / iperbole / gesperbo
c.c.p. n°18231407

Jaro / Anno 60 - n 1
Marto/Marzo 2010
Redaktoro - redattore
Mario Amadei

TAGO DE LA GEPATRA LINGVO

Mesaĝo de Barbara Pietrzak, UEA Ĝenerala Sekretario, okaze de la 42a SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Februaro de jaroj spronas nin al enpensiĝoj kaj aktivadoj, ne sole en niaj kluboj kaj grupoj. Instigas nin al tio Internacia Tago de la Gepatra Lingvo kaj Semajno de Internacia Amikeco.

La 21-an de februaro, jam la 11-an fojon ni havos la okazon aparte organiziĝi por reliefigi nian engaĝiĝon por la lingva kaj kultura diverseco de la mondo, lige kun Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. Nunjare ĝi okazas kadre de la Internacia Jaro de la Proksimiĝo de Kulturoj kaj ĉi-kuntekste valoras memori, ke la nunjara kongrestemo kongruas kun la temo de la Jaro.

42a SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO
21-27 FEBRUARO 2010

Paco kaj amikeco trans limo

Senĉese akompanas nin la konscio, ke la prema plimulto de la nun ekzistantaj lingvoj estas minacitaj de malapero. Samtempe ne forlasas nin la konscio, ke la gepatra lingvo determinas nian mondpercepton, sendepende de la kvanto de la pli poste alprorigataj lingvoj, tamen la lernado de aliaj lingvoj ebligas konatiĝi kun aliaj mondkonceptoj kaj aliaj sintenoj.

Inter tiuj aliaj lingvoj apartan lokon okupas Esperanto, ĝi unike pontas al la mondkoncepto kaj sinteno de ĉiu alinaciano, aligentano, kiu same kiel ni elektas por la internacia komunikado komunan, neutralan lingvon.

Tiu lingvo jam en la lernoprocezo trempas ĉiun lingvoadepton en la krea kaj riĉiga intelekta aventuro kaj de ĉiu E-parolanto forprenas la paralizigan senton de lingva subkompetento,

kio estas diversgrade neevitebla en la alproprigado de etnaj lingvoj.

La nunajarajn solenadojn de la Tago de la Gepatra Lingvo tegmentas la temo "Signifo de plurlingveco, de la lernado de fremdaj lingvoj kaj tradukado favore al paco kaj dialogo". Ĉirkaŭe de ni lige kun la 21-a de februaro okazos multaj aranĝoj.

Ni partoprenu ilin prezentante la avantaĝojn de Esperanto por la senĝena kaj demokrata komunikado, por paco kaj dialogo.

Al niaj kluboj kaj grupoj ni invitu inter alie reprezentantojn de organizoj laborantaj por interkultura dialogo, membrojn de naciaj malplimultoj, eksterlandajn studentojn ks. Ni ne nur aŭskultu iliajn deklarojn, lingvoprezentojn, kantojn kaj deklamojn.

En amika dialogo ni montru kiel ni, esperantistoj praktike alportas kontribuon al konservo de la gepatraj lingvoj kaj lingvoriĉo de la mondo.

La Tago de la Gepatra Lingvo nunjare inaŭguras la eventon kun multe pli longa tradicio en nia E-komunumo, nome la Semajnon de Internacia Amikeco, kiu pasos dum la lasta plena semajno de la monato.

Festata de pli ol 40 jaroj ĝi origine celis plivigligi la kontaktojn inter esperantistoj de diversaj landoj por plifortigi iliajn ligojn kun rondoj ekster la E-movado.

Sendube nun unu el la vojoj vigligantaj tiujn kontaktojn estas la Interreto, sed la devizo de la semajno "Amikeco trans limoj" senĉese validas.

Ni gardu kaj flegu la flamon de tiu amikeco, kiu signifas justecon, fratecon kaj pacon inter homoj kaj popoloj.

Ni invitu kunfesti la Semajnon ankaŭ tiujn, kiuj nin najbaras, sed ankoraŭ ne estas esperantistoj.

Ni montru al ili, ke Esperanto estas ankaŭ sinonimo de egeleco kaj solidareco inter la homoj kaj nacioj, ke Esperanto signifas respekton de la homaj rajtoj.

Sed same kiel dum jaroj, tiel ankaŭ nun la salutvortoj interŝanĝataj en la daŭro de la Semajno donu al ni novan, vivigan energion por progresigi niajn agadojn kaj vastigi nian E-komunumon.

Miaj vortoj rolas sole kiel memorigo. Viaj raportoj pri konkretaj aranĝoj kaj eventoj teksu buntan bildon de niaj porokazaj aktivadoj tra la mondo.

Barbara Pietrzak - Ĝenerala Sekretario, estrarano pri informado. abpietrzak@yahoo.com

BOLONJA ESPERANTO-GRUPO
"Achille Tellini 1912"
Sabaton la 13-an de marto,
je la h. 15,30 ĉe nia klubejo
Jarkunveno, Ordinara Asembleo

☆

Ore 15,30 Assemblea generale ordinaria dei soci

En Bolonjo.

*La lasta semajno de februaro (de 21 ĝis 28. 2010) kie*l ĉiujare estas sub la devizo Amikeco trans limoj. Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de la Internacia Lingvo, ĝi estas taŭga okazo por komuna evento kun neesperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj. Amikeco riĉigas la vivon.

42a SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO



Paco kaj amikeco trans limoj

Sinsekve jam de 42 jaroj, Bolonja Esperanto-Grupo "A.Tellini 1912", same kiel pluraj aliaj kluboj tra la mondo, tradicie festas ĉi tiun okazaĵon per kunvenoj kaj aranĝoj, al kiuj oni invitas partopreni, krom la klubanojn, ankaŭ aliajn kulturajn urbajn asociojn.

Kun danko kaj ĝojo ni pensas pri vi, mia amiko, sendante al vi SIA-n salutkarton.
Nome de la geklubanoj, samideanajn SIA-salutojn,
gesperbo@iperbole.bologna.it
Jen la ĉi-jara salutkarto (en verda koloro), kiun oni forsendas al konatuloj kaj ekstelandaj geamikoj okaze de la 42.a SIA.

☆

En Triesto.

Karegaj geamikoj! Kiel sciate, la lasta semajno de februaro estas dediĉita al Internacia Amikeco. Indas ne flankenmeti ĉi gravan tradicion, tial ĉijare ni deziras vin inviti al Triesto por amika kunestado.
Programo ne grandiozas, sed grandioza povus iĝi se ĉiu el ni kontribuos al ties interesoveka disvolviĝo. Jen skize la plano:
- Vendrede la 26an de februaro: renkontiĝo je la 19a horo, ĉe TEA-sidejo (Via del Coroneo, 15, 3a etaĝo) - projekciado de bildoj pri Triesto kaj aranĝoj esperantistaj, okazintaj en la ĵus finiĝinta jaro;
- Sabate la 27an: matene (proksimume je la 10h30): vizito de Posta Muzeo (antau kelkaj monatoj renovigita) (placo Vittorio Veneto, ĉe la Centra Poŝtoficejo);
13h00 - Komuna tagmanĝo (bufeda) en la sidejo de Triesta Esperanto-Asocio (nepras ke ni sciu kiom da personoj alvenos, por ĉies kontetigo).
15h00 - Duonhora gitarkoncerto de la franca esperantisto Francois Stride..... poste: Bonvenas via kontribuo: ĉu eble vi ŝatus ion prezenti, paroli, aŭ legi poeziaĵon, aŭ mi ne scias kion alian? lige kun la temo "Internacia Amikeco" ? Bonvolu anonciĝi !
-19a- horoj - foriro de gastoj (se nepre ili devas foriri riri, alimaniere ni volonte zorgus pri via tranoktado en Triesto) - Dimanĉe la 28an - matene perboata ekskurso (se vetero tion permesos!) al Muggia, vizito de la urbeto, gastigo ĉe esperanto-geamikoj, komuna tagmanĝo (ĉu fiŝa ???) ie en la urbeto mem. Reveno al Triesto boate aŭ buse. Esperante je via nombra partopreno, kiun vi bonvolos konfirmi, plej samideanajn salutojn sendas Triesta Esperanto-Asocio.
Elda Doerfler *testudo.ts@gmail.com*

1910 - 2010 I.E.F. CENTIARA

Antaŭ cent-jaroj en la urbo Florenco oni fondis la Italan Esperanto-Federacion.
Ĉi tiun gravan eventon estas solene festata, kun la komunuma patroneco en la fama urbo, la 20an de marto en la historia urbodoma "Palazzo Vecchio".
La programo antaŭvidas, inter alie, la enmurigon de memoriga marmora tabulo en la sama loko de la fondiĝo. Inter la fondintoj ĉeestis ankaŭ Achille Tellini (nia bolonja iniciatinto) kaj aliaj agemaj pioniroj kaj estis organisita tie la 1-an Nacian E-Kongreson, krome ankaŭ oni ekpublikigis la unuan numeron de I.E.F. oficialan organon.
La Centjariĝa estos festata plurloke tra la tuta lando kaj tra la tuta jaro, ricevos sian apartan atenton ankaŭ dum la Itala Kongreso en Lignano Sabbiadoro, 21 - 28 aŭgusto, dediĉita kaj al rememoraj kaj, ĉefe, al planoj por la ceteraj jarcentoj.

Anno I. (c. c. con la posta) Aprile 1910. (c. c. con la posta) N. 1.

ATTI
DELLA
Federazione Esperantista Italiana
BOLLETTINO BIMESTRALE

Direzione: Via dei Neri, N. 1, — FIRENZE — *Amministrazione*: Via de' Pucci, N. 17
Abbonamento annuo Lire 0.50 — Un numero separato centesimi 10.
— GRATIS alle Società federate ed ai Soci isolati della Federazione Esperantista Italiana —
INSERZIONI: PREZZI DA CONVENIRSI

IL I° CONVEGNO
degli Esperantisti Italiani

Il I Convegno degli Esperantisti italiani si riunì a Firenze nei giorni 21, 22 e 23 marzo, con la presenza di molti delegati delle Associazioni Esperantiste italiane ed anche di stranieri. Delle discussioni e delle deliberazioni sarà pubblicato il resoconto a cura dell'Associazione Esperantista Fiorentina.

Qui si riferiscono i deliberati attinenti alla Federazione.

Nella 1ª seduta, in seguito alla discussione sul tema **Organizzazione degli Esperantisti in Italia** (relatore C. A. Viterbo) fu deliberato di costituire una *Federazione fra la Società Esperantiste* e gli *Esperantisti isolati d'Italia* e fu dato l'incarico di compilarne lo Statuto ad una Commissione composta dai Sigg. Prof. Clarence Bicknell, prof. Giuseppe Signorini, dott. Alfredo Stromboli e C. A. Viterbo.

Fu approvato il seguente ordine del giorno:

Il primo Convegno degli Esperantisti Italiani,

Convinto che il movimento Esperantista farà progressi in Italia solo quando gli Esperantisti saranno organizzati;

considerando che questa organizzazione dovrà tener conto delle Società e dei gruppi regionali e locali:

delibera di fondare la

FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA.

Lo Statuto, quale si pubblica in altra parte di questo numero, fu discusso ed approvato nella seduta del 22 marzo; e nella medesima fu votata a grande maggioranza, come sede stabile della Federazione, la città di Firenze.

Il Comitato Federale fu votato nella successiva seduta, rimanendo eletti a maggioranza i Sigg. Bagnulo avv. Raffaele di Napoli; Del Re Luigi, commerciante libraio, Firenze; Giulietti dott. Francesco, presidente dell'Istituto Stenografico Toscano, Firenze; Mis Hall Ruth J., Firenze; La Colla Stefano, studente di Università, Palermo; Meazzini Giacomo, sacerdote, Arezzo; Morgari rag. Oddino, deputato al Parlamento; Niccolini ing. Ferruccio, Piombino; Sigiorini prof. Giuseppe, pubblicista, Firenze; Stromboli dott. Alfredo, chimico, Genova; Tellini Achille, dottore in Scienze Naturali, Bologna; Viterbo C. A., studente, di Università, Firenze.

Il Convegno votò anche alcuni ordini del giorno riguardanti la Kongresa Societo della Scienca Esper. Oficejo, la pubblicazione di un supplemento all'« Esperanto » di Ginevra, per gli Esperantisti italiani, e la propaganda dell'Esperanto in rapporto colla Dante Alighieri, coll'Alliance Française, col Touring Club Italiano, colla Croce Rossa e colla Società della Pace.

42-a Settimana dell'amicizia internazionale

In tutto il mondo esperantista si celebra nell'ultima settimana di febbraio la "SIA", giunta alla sua 42-a edizione, ha lo scopo di rafforzare i contatti e l'amicizia internazionale tramite l'esperanto. Due quest'anno sono gli appuntamenti principali a Bologna e a Trieste.

1910-2010 Centenario della FEI

A Firenze cento anni fa fu fondata la Federazione Esperantista Italiana, con il patrocinio del Comune la ricorrenza sarà celebrata il 20 marzo nella prestigiosa sede di Palazzo vecchio con un convegno commemorativo a cui hanno aderito personalità della Cultura.
A Lignano Sabbiadoro si svolgerà il 77° Congresso Italiano di Esperanto (21-28 agosto) che proseguirà la celebrazione con un programma di convegni e studi per il proseguimento dell'attività della FEI.

ALVOKO EL HIROSIMO

Ni Hirosima Esperanto-Centro kiel unu el 19 organizoj sub la Plenuma Komitato de Internacia Virina Tago 2010 Hirosima lanĉis la mesaĝon, kaj jam ricevis 158 respondojn el 44 landoj pere de Esperantistoj en la mondo. Ni petas vin responde doni vian mesaĝon al ni, kaj se eble transdoni la mesaĝon al viaj geamikoj ĝis limdato la 25an, februaro

---

Mesaĝo por Internacia Virina Tago 2010

Karaj virinoj en la mondo, Nome de kunveno en Hirosima por la Internacia Virina Tago 2010 ni sendas al vi elkoran saluton de amikeco. Nia plenuma komitato konsistas el 19 organizoj kiuj ĉiutage aktivas en diversaj medioj por egalrajtoj inter viroj kaj virinoj, altigo de virina posteno en la socio, konstruo de la socio de komuna partopreno de geviroj, kaj paco. Ni havos kunvenon por la Internacia Virina Tago en la 7a, marto, 2010. Nun internacie leviĝas altaj ondoj por "la mondo sen nuklearmiloj" kordezirata de ni en Hirosima okaze de enoficiĝo de s-ro Obama kiel usona prezidento, kaj la ŝanĝo de japana registaro. Sed, samtempe kreskas pli da danĝeroj, dislokiĝoj de nuklearmiloj kaj ties ebloj de uzado, kaj riskas Pakton de Ne-disvastigo de Nukleaj armiloj (NPT), solan internacian kanalon klopodi al redukto de nuklearmiloj. Nun ni staras ĉe vojkruco por grava elekto cele al realigo de paca mondo.

La 6an de aŭgusto, 2009, la urboestro de Hirosima en sia Paca Deklaro apelis "Perspektivon 2020" realigi nuligon de nuklearmiloj ĝis la jaro 2020, kordeziron de hibakŝoj "Neniu aliaj havu vivon de atombombitoj." La Monda Konferenco de Urboestroj al Paco, al kiu pli ol 3000 urboj apartenas el tuta mondo, klopodas por ke la kunveno de reekzameno de NPT adoptu en la jaro 2010 la Protokolon de Hirosima-Nagasaki, kiu konkretigas la "Perspektivon 2020." Ni el Hirosima responde al ĝi luktas levi ondojn de internaciaj voĉoj realigi nuligon de nuklearmiloj sur la tero. Ni petas vin bonvole doni vian mesaĝon, kiun ni en la kunveno de la Virina Tago ekspozicios, kaj kune kun voĉoj el Hirosima portos al la kunveno de reekzameno de Pakto de Ne-disvastigo de Nukleaj armiloj en majo 2010, en Novjorko, Usono. S-ino ABE Kyoko, Prez. de Plenuma Komitato por la Internacia Virina Tago 2010 Hirosima, kaj Municipo Hirosima Kun guberniaj kaj urbaj organizoj: Arko de Hirosima; Ligo de WE-palaco; Kina karavano; Novjapana virina asocio; Tutlanda ligo de vartistoj; Hirosima Esperanto-Centro; Ligo de medicinaj sindikatoj; Emerita sindikato; Instruista laborsindikato; Ligo de solaj patrinoj kaj infanoj (gubernia kaj urba); Laborsindikato de municipaj oficistoj; Laborsindikato de urbaj oficistoj; Ligo de patrinoj; Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hirosima; Ligo de virinaj asocioj WE-Net; Ligo de komercistoj; Virina demokrata klubo/YMCA.

Kontaktoadreso: s-ino OSIOKA Taeko
osioka@mua.biglobe.ne.jp

In sintesi.

In occasione della Festa Internazionle della Donna, le esperantiste giapponesi lanciano al mondo un messaggio per l'abolizione totale delle armi nucleari che hanno causato nel loro Paese distruzioni e lutti.

☆

I giovani esperantisti italiani invitano a partecipare al 34° Festival Internazionale in Trentino nei giorni di Pasqua.

☆

Alla fine di maggio, a San Pietroburgo si festeggerà il Centenario della Associazione Esperantista Russa, che inserito nel programma del 26° Congresso nazionale, avrà un interessante svolgimento; il post-congresso sarà a Mosca. Per parteciparvi, da Bologna si sta organizzando un viaggio in comitiva (vedi pag.5)

34-a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

La Itala Esperantista Junularo organizas ĉi-jare la 34-an Internacian Junularan Festivalon en Roncegno, en la belega regiono Trentino, de la 31-a de marto ĝis la 6-a de aprilo. En la programo estas antaŭ viditaj teatraĵoj, koncertoj, rolludoj, debatoj, diskutrondoj, kursoj pri danco kaj itala kuirarto, gustumado de lokaj vinoj kaj manĝaĵoj, sed ankaŭ sciencaj prelegoj kaj kursoj pri lingvoj; partoprenos ĝin pli ol cento da homoj el la tuta mondo; dum la festivalo okazos ekskursoj al la belega montaro de Trentino-Supra Adiĝo kaj al ties plej vizitindaj urboj; la festivalejo atingeblas facilege per trajno, buso, automobilo, aviadilo kaj eĉ biciklo (biciklovojo Valsugana).

Do IJF estas la plej mojosa Esperanto-festivalo! Kaj la ĉijara programo daŭre havas nepardoneblan mankon, kiun ni ne sukcesis plenigi ĝis nun: mankas... Ankoraŭ estos nur kvar semajnoj antau. Ĉijare pasigu vian paskan libertempon kune kun junuloj el la tuta mondo! Kial partopreni? Ĉiuj informoj troveblas en la retpaĝaro: *http://iej.esperanto.it*.

☆

26-a RUSIA ESPERANTISTA KONGRESO

SANKT-PETERBURGO 27/31 - 05 -2010

Antaŭ 100 jaroj en Sankt-Peterburgo okazis unua Rusia Esperantista Kongreso, en kiu partoprenis kreinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof. Rusiaj esperantistoj celebros la jubileon per tradicia tutlanda kongreso en la dua rusia ĉefurbo kaj invitas gastojn el la tuta mondo.

Venu ĝui belegan urbon, ĝiajn muzeojn, teatrojn, katedralojn; promeni piede en parkoj kaj ŝipe sur kanaloj kaj rivero Neva; venu ekkoni rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusiaj esperantistoj! La kongresejo troviĝas tre oportune – en centra parto de la urbo. La programo de la Kongreso estos varia kaj multflanka. Enkadre de la Kongreso okazos vica konferenco de REU, kunveno de REJM, prelegoj pri historio de Esperanto-movado en Rusio, pri festivaloj. La kongresanoj spektos teatraĵojn en Esperanto kaj kelkajn koncertojn. Estos abunda turisma programo, kiun ornamos "blankaj noktoj" kaj urba festo okazonta en samaj datoj en Sankt-Peterburgo! Por la kongresanoj estas rezervitaj loĝlokoj en hoteloj de diversa nivelo, situantaj ĉefe en centra parto de Sankt-Peterburgo. La mendilo por la hoteloj kaj por ekskursa programo estos sendita al la kongresanoj kun Dua informilo en decembro. *www.reu.ru*

Postkongreso okazos en Moskvo

Ĝi okazos la 1an – 5an de junio en Moskvo. La kongresanoj post Sankt-Peterburga REK povos turismi en Moskvo, apudmoskva regiono kaj krome partopreni en vica moskva konferenco de sciencistoj-esperantistoj, kiu okazos samtempe. La detaloj aperos en la dua kongresa informilo.

Un ritratto disincrostato dalla patina del tempo

M. T. Campiani

Quando si tratta di ripensare a un personaggio importante del passato difficilmente riusciamo a liberarci dalle incrostazioni che si sono formate nella nostra mente via via nel tempo e che ce lo hanno reso venerabile sì, ma nel suo complesso piuttosto ingessato e distante. Un ritratto di Zamenhof a colori, disincrostato dalla patina del tempo si è presentato recentemente ai nostri occhi per merito di Renato Corsetti che ci ha fornito la vita e un immagine dell'iniziatore dell'esperanto. Dall'adolescenza alla maturità lo vediamo in azione nel panorama variegato della Polonia zarista durante gli anni delle riforme di Alessandro II e della reazione del suo successore. Lo vediamo in famiglia non assecondato dal padre Mark che non voleva che suo figlio, di grande talento, si occupasse di altre cose al di fuori della medicina. Come rappresentante della forma ebraica dell'Illuminismo, che mirava a infrangere e superare l'isolamento ebraico, il padre, che credeva nella partecipazione attiva degli ebrei al processo evolutivo delle società circostanti come condizione indispensabile per migliorare la loro condizione materiale, era riuscito a qualificarsi professionalmente ricoprendo cariche statali; era infatti insegnante liceale di geografia, lingua tedesca e francese e per un certo periodo anche censore. Il figlio, come spesso accade nelle famiglie, seguiva altre vie, non rinunciando ai suoi sogni. Negli anni degli studi e della professione di medico, dopo diversi tentativi per creare una lingua internazionale che agevolasse la comprensione reciproca e che potesse proporsi come lingua ponte fra tutte le comunità ebraiche, le quali nei secoli avevano assunto la lingua dei popoli presso cui si erano dispersi, finalmente, con l'aiuto materiale del suocero, pubblicò la prima grammatica. Ma intanto si stava diffondendo un'altra lingua pianificata, il volapuk, opera del prete tedesco Martin Schleyer, con un vocabolario di parole inglesi e tedesche abbreviate a una sola sillaba. L'esperanto dovette confrontarsi con questa lingua che, sorta in un momento storicamente favorevole, si rivelò in seguito di non facile comprensione e memorizzazione; mentre l'esperanto, che si costruiva con radici prese dalle parole più usate di tutte le lingue indoeuropee, per la sua semplicità e regolarità grammaticale, finì per conquistare anche diversi volapukisti. Nello stesso tempo il giovane Ludwik, mentre si diffondeva il sionismo, desiderava che il suo popolo, vittima dei pogrom e di un diffuso antisemitismo si ricongiungesse e, pur rifuggendo da qualsiasi forma di nazionalismo, egli pensava che gli Stati Uniti d'America per la loro vastità fossero adatti ad accogliere la sua gente, libera dalle millenarie persecuzioni. Si occupò anche del problema religioso, aderendo in un primo tempo agli insegnamenti del rabbino Hillel che, in gran parte contemporaneo di Gesù Cristo, proponeva una religione ebraica spoglia delle aggiunte accessorie, approdando in seguito a una religione dell'umanità," l'homaranismo", divenuta l'interna idea dell'esperanto.

Questi a grandi linee alcuni degli argomenti dell'intervento di Renato Corsetti che, seguito alla presentazione di Daniele Agostini e all'introduzione di Emilio Campos, ha tenuto avvinto un folto uditorio, anche non esperantista, durante la celebrazione del 150° anniversario della nascita di Zamenhof, che ha avuto luogo il 9 dicembre 2009 al Museo Ebraico di Bologna. Al termine un'effigie di L.L.Zamenhof è stata consegnata al Museo da parte del Gruppo Esperantista Bolognese "Achille Tellini 1912". Quindi tutti i partecipanti si sono diretti verso una sala attigua per gustare l'aperitivo gentilmente offerto dagli ospiti, occasione di lieti conversari.

Esperanto, 110 lode

Fabio Bettani

Da qualche tempo, il Gruppo ha il piacere di accogliere le visite di un nuovo esperantista bolognese: il 32enne Pierfrancesco Naccarato. In occasione della festa di inizio anno, celebrata il 9 gennaio, è stato presentato al GEB il suo recente lavoro: una tesi di laurea sull'esperanto. La tesi è stata discussa a novembre 2009, presso il Dipartimento di Comunicazione dell'Ateneo di Bologna, ed ha per titolo **"L'esperanto: la storia, la comunità, le problematiche, la lingua."**

Si tratta di un lavoro che cerca di rintracciare gli aspetti più rilevanti dell'esperanto e dell'esperantismo, sia guardando alla storia passata sia al movimento e alla lingua attuali.

I capitoli trattano i seguenti punti: 1) la lingua e il suo insegnamento; 2) la storia e i valori dell'esperantismo; 3) le critiche dei linguisti e quelle interne al movimento; 4) le caratteristiche della comunità e di alcune realtà locali. In questo capitolo, ampio spazio è dedicato al racconto della vita associativa del Gruppo di Bologna. La tesi si conclude con la panoramica di alcuni testi significativi, sia tradotti sia scritti direttamente in esperanto. Pierfrancesco ha gentilmente donato una copia della tesi alla biblioteca del GEB, dove è possibile consultare l'opera.

Presto verrà fatta avere una copia anche alla Biblioteca Italiana di Esperanto, a Massa. Il risultato della tesi è stato ottimo: 110 e lode! Congratulazioni a Pierfrancesco da parte di tutto il gruppo.

http://forum.esperanto.it - http://giovani.esperanto.it

Cena al GEB, Pierfrancesco Naccarano ci presenta la sua tesi

VIVO DE LA GRUPO ☆ VITA DEL GEB

NIAJ SEMAJNAJ RENKONTIĜOJ - I NOSTRI INCONTRI SETTIMANALI
***Regulaj kunvenoj ĉiu merkrede kaj sabate* - h. 16,30 - 19**
Gli appuntamenti di ogni mercoledì e sabato. Tel. 333 427 9921

CONVEGNI, CENE E VARIE NEVICATE

Nei mesi scorsi, la nostra attività è stata molto intensa, principalmente quella rivolta al pubblico della città con due importanti convegni che hanno avuto un buon successo e con un'ottima partecipazione di cittadini.
Nell'ambito della "Festa della Storia", organizzata dall'Università di Bologna, il 25 ottobre abbiamo organizzato, presso la prestigiosa sede dell'Hotel Corona D'Oro, il convegno "100 anni dell'Esperanto a Bologna", ricordando la prima attività di Achille Tellini a Bologna nel 1909. L'importante incontro è stato finanziato con i proventi del "5 X mille" messi a disposizione dalla FEI ai gruppi che organizzino iniziative pubbliche.
L'altro appuntamento si è svolto il 9 dicembre al Museo Ebraico di Bologna: in collaborazione con la Direzione del Museo, abbiamo ricordato il 150° anniversario della nascita di Zamenhof con una conferenza a cui ha preso parte anche il Presidente della FEI Dott. Renato Corsetti.
Gradevole è stato il pomeriggio del 19 dicembre con il tradizionale incontro prenatalizio con il brindisi e lo scambio di auguri; purtroppo i 25 cm di neve hanno messo in difficoltà i numerosi soci ed amici che già erano pronti ad imbandire le tavole della sede per una cena sociale. L'appetito ha dovuto aspettare sino al 9 gennaio, quando al GEB è arrivata "la Verda ŝtrumpo", la cena dell'Epifania. Ospite d'onore della serata è stato il giovane Pierfrancesco Naccarato che ci ha commentato e fatto dono della sua tesi di laurea (vedi pagina 4). Tra brindisi e lotteria, l'atmosfera è stata gioiosa ed allegra.
Tra neve e maltempo, purtroppo in febbraio il programma previsto per i nostri incontri in sede ha subito varie modifiche. Durante la tregua meteorologica di sabato 20 febbraio, abbiamo festeggiato nella nostra sede la 42-a Settimana dell'Amicizia Internazionale e la ricorrenza della Giornata della lingua materna, patrocinata dall'Unesco
Un buon numero di soci ha partecipato all'incontro tra cui il giovane esperantista spagnolo Victor Manuel Macias e la samideanino russa-bolognese Alla Kudrishova. Il segretario Amadei ha illustrato, con brevi parole, il significato della iniziativa che il GEB ricorda da ormai 42 anni. Sono state presentate alcune poesie sul tema ***"Amicizia oltre i confini"***, a cui ha fatto seguito l'invio di cartoline agli amici di vari paesi esteri. Un gradito rinfresco ha concluso l'incontro.

ANDIAMO IN RUSSIA?

In occasione del 26° Congresso Esperantista Russo e del Centenario dalla "Rusia Esperanto Asocio" vi propongo un viaggio in aereo a San Pietroburgo e a Mosca. Programma previsto: partenza mercoledì 26 maggio da Bologna, arrivo a San Pietroburgo, partecipazione al congresso sino alla fine del mese. Il 1° giugno trasferimento a Mosca (post-congresso), incontro con gli esperantisti che per 4 giorni ci guideranno nella visita della città, Il 5 giugno partenza per Bologna dall'aeroporto moscovita. Per informazioni, contattatemi entro il 10 marzo. Mario Amadei, tel. 051 644 66 75. amadeimario@iperbole.bologna.it

I PROSSIMI INCONTRI

Nel mese di marzo due sono gli appuntamenti a cui non mancare: sabato 6, alle ore 17 ***Festa della Donna*** a cui seguirà alle 19,30 la cena sociale in sede.
È gradita la presenza di tutti coloro che vorranno parteciparvi (previa prenotazione entro giovedì 4 marzo al tel. 051 644 6675); sabato 13 (alle ore 16 in seconda convocazione), Annuale Assemblea Ordinaria dei soci. È doverosa la partecipazioni di tutti gli associati.

Al mercoledì pomeriggio prosegue l'incontro *Paroliga kurso* e il servizio di biblioteca e archivio, mentre sono così programmati gli incontri del sabato:

6 mar. **h. 17- Virina festo kaj je la 19,30 komuna vespermanĝo.** Festa in onore delle socie ed amiche del GEB, alle 19,30 Cena sociale in sede.

Sabaton la 13-an de marto en nia klubejo, h. 15,30 Jarkunveno Ordinara Asembleo

☆

Ore 15,30 Assemblea annuale dei soci

20 mar. **Ni partoprenos la Kunvenon en Florenco de IEF-Centjariĝo.** Saremo a Firenze al convegno del Centenario della FEI.

27 mar. **Pri la 26-a Rusia Esperanto-Kongreso en Sankt-Peterburgo**. Notizie sul Cogresso degli esperantisti russi a San Pietroburo, a cui alcuni soci ed amici del GEB programmano di partecipare a fine maggio.

3 apr. **Pasko-festoj: la sidejo estas fermita.** Per le feste pasquali la sede resta chiusa.

I0 apr. **El Esperanto-gazetaro**. Rassegna mensile della stampa esperantista.

17 apr **Voĉdonu la novan IEF/statuton.** Incontro informativo per invitare tutti i soci a votare il referendum per il nuovo Statuto/FEI entro il termine utile del 18 maggio p.v. La votazione risulterà valida se voteranno almeno i 2/3 degli associati. La votazione deve essere fatta usando la scheda e busta inviata dalla FEI

24 apr **Trarigardo en nia biblioteko.** Le novità della nostra biblioteca.

1° mag. **Internacia festo, la sidejo estas fermita**. Festa internazionale del lavoro, la sede resta chiusa.

8 mag. **El Esperanto-gazetaro**. Rassegna mensile della stampa esperantista

15 mag. **Pri la 77-a Itala Kongreso de Esperanto**. Notizie del Congresso nazionale di Lignano Sabbiadoro

22 mag. **Raporto pri la E-radio elsendoj.** I programmi radiofonici in Esperanto.

Forpasis Umberto Broccatelli

Kun granda doloro ni anoncas la forpason de kara amiko Umberto Broccatelli, nia a-mema senlaca aktivulo, unue en Bolonjo kaj poste en Romo, krome en nacia kaj internacia movado.
La anoj de Bolonja E-Grupo "Achille Tellini 1912" esprimas la plej sincerajn kondolencojn al la familianoj pro la grava perdo de kara amiko Umberto.

UMBERTO BROCCATELLI
(Bologna 1931- Roma 11 feb. 2010)
Li esperantiĝis en 1947 kaj tuj ekaktivis movade, estante unu el la refondintoj de *Bolonja E-Grupo "A. Tellini"* kaj ĝia sekretario dum kelkaj jaroj. Samjare li aliĝis al Intemacia E-Ligo, kiu tuj poste kunfandiĝis kun UEA. Li kunorganizis nacian kongreson en Bolonjo en 1952 kaj la 40-an UK samurbe en 1955. En 1980 li estis elektita en la Nacia Konsilio de IEF. Li restis konsiliano de IEF ĝis 2005 kaj plurfoje, ĝis 1999, membris en ĝia estraro. De 1989 ĝis 2002 li redaktis la organon de IEF, "*l'esperanto".* Li iniciatis la aliĝon de IEF al la Itala Konsilio de la Europa Movado, en kies gvida komitato li poste reprezentis IEF. En 1999 li reaktivigis Eŭropan E-Union, kiun li prezidis, ankaŭ redaktante ĝian informilon "*Eŭropa Bulteno"*, de 1999 ĝis 2004, kiam li refariĝis honora prezidanto de EEU.
Broccatelli aŭtoris la vortarojn *Vocabolario Esperanto-Italiano* (1984) kaj *Dizionario Italiano-Esperanto, Esperanto-Italiano* (2004) kaj la lernolibron *Nuovo Corso di Esperanto*, per allievi e autodidatti (1993). Li multe artikolis pri lingvaj demandoj de Esperanto, pri kiuj ankaŭ lia broŝuro Esperanto, lingvo planebla (1996) kaj pri eŭropaj aferoj. Li prizorgis la E-eldonon de la gazeto La partio Nova de Transnacia Radikala Partio. Broccatelli tradukis ankaŭ beletraĵojn, i.a. por Itala antologia (1987). En 2006 dum la 91-a UK en Florenco li estis nomita UEA Honora Membro.
Kolektado de Mario Amadei de "Biografia leksikono de italaj esperantistoj".

Florenco 2006, 71-a Universala kongreso de Esperanto, Umberto Broccatelli estas nomita UEA Honora membro; en la foto, maldektre: Osmo Buller, UEA - Ĝenerala direktoro, Renato Corsetti UEA Prezidanto, Umberto Broccatelli, la skabeno pri kulturo de urbo Florenco, Giani.

CON LA SCOMPARSA DI UMBERTO, ABBIAMO PERSO UN PEZZO DELLA NOSTRA STORIA.

Umberto Broccatelli (Bologna 1931- Roma 11 febbraio 2010) divenne esperantista nel 1947 e subito si rese attivo nel movimento affermandosi come uno dei rifondatori del Gruppo Esperantista Bolognese "A.Tellini" e per alcuni anni suo segretario. Nello stesso anno aderì alla Lega Internazionale Esperantista che subito dopo si fuse con l'U.E.A. Fu uno degli organizzatori del congresso nazionale a Bologna nel 1952 e del 40° congresso mondiale nella stessa città nel1955.

Bologna 1955, il Comitato organizzatore del 40° Congresso Universale, Umberto Broccatelli il primo in basso a sinistra. (Foto archivio GEB)

Nel 1980 fu eletto nel Consiglio Nazionale della F.E.I., restò consigliere fino al 2005 e più volte, fino al1999 fece parte del direttivo. Dal 1989 fino al 2002 fu redattore dell'organo della FEI "L'Esperanto".
Fervente promotore dell'Idea Europea. fu promotore dell'adesione della FEI al Consiglio Italiano del Movimento Europeo, nel cui comitato direttivo egli rappresentò la FEI. Nel 1999 riattivò l'Unione Esperantista Europea di cui fu presidente anche redigendo il suo mezzo di informazione "il Bollettino Europeo" fino al 2004 quando egli divenne presidente onorario dell'Unione Esperantista Europea.
Broccatelli fu l'autore del vocabolario Esperanto-Italiano (1984) e del Dizionario Italiano-Esperanto = Esperanto-Italiano (2004) e della grammatica Nuovo Corso di Esperanto per allievi e autodidatti (1993).
Scrisse molti articoli sui problemi linguistici dell'Esperanto, a proposito dei quali anche la pubblicazione "Esperanto, lingua pianificabile" (1996) e sugli argomenti europei. Egli curò l'edizione esperantista del giornale "Il Partito Nuovo" del Partito Radicale Transnazionale. Tradusse anche numerosi lavori letterari, fra l'altro, per l'Antologia italiana (1987).
Nel 2006 durante il 91° Congresso Internazionale in Firenze egli fu nominato "Membro Onorario dell'U.E.A."
(Lessico biografico degli esperantisti italiani, raccolta di Mario Amadei)

2004 L'ultima sua opera